

# Eŭropa Bulteno

Januaro 2015, Numero 145

## ALVOKO AL LA DIPLOMATOJ de D-ro L. L. Zamenhof, 191 - Ni memorigu ĝin dum 2015!

En 1959, la 100a datreveno de lia naskiĝo, UNESCO formale agnoskis doktoron Ludwik Zamenhof kiel "unu el la elstaraj personecoj de la homaro" pro lia tutviva laboro por la paco. Antaŭ 100 jaroj precize Zamenhof publikigis sian "Alvokon al la Diplomatoj". Mia kolego kaj amiko, la sperta slovaka diplomato, Jozef Reinart, proponis ke ni memorigu la alvokon de Zamenhof dum 2015 per ties ĝisdatigo al la nuna mondo. Kelkaj diplomatoj, parolantoj de Esperanto, nun laboras je tia ĝisdatigo.



Jen kelkaj elĉerpoj el la originala alvoko de Zamenhof:

*Sinjoroj diplomatoj!  
Post la terura eksterna milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan, kiu sola*

*konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas : forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj.*

...  
*Ĉiu regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj, kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas; neniu gento en la regno devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajtojn aŭ devojn ol la aliaj gentoj.*

Hodiaŭ ni ne plu troviĝas en mondmilito, sed ekzistas multaj armataj konfliktoj tra la mondo... Ukrainio, Irako, Sirio kaj aliaj landoj en kiuj mortis perforte ĝis nun centmiloj da homoj. La terorismo daŭre murdas homojn kaj klopodas murdi la liberecon sin esprimi kiel en

Parizo komence de 2015. La mondo ne lernis la lecionon de la Unua Mondmilito, ĉar la vortoj de Zamenhof kaj aliaj ne estis aŭskultataj. Nur 21 jarojn post la Unua Mondmilito venis alia Mondmilito, eĉ pli sangosoifanta. Sekvis la Malvarma Milito, kiu ne iĝis varma nur pro la timo de la nukleaj armiloj de la alia flanko.

Esence la homaro lernas nur malrapide, eĉ post du mondmilitoj. Mankas tro ofte la akcepto de la libero kaj samrajteco de alia homo, de ties rajto malsami de ni, de ties rajto kredi laŭ iu religio, aŭ tute ne kredi, laŭ libera elekto. La vivcelo de Zamenhof estis daŭra paco en la mondo, baze de la samrajteco de ĉiuj homoj kaj neŭtrala internacia lingvo estis por li nur unu ilo por atingi tion. Ne estas diferencoj kiuj estigas konfliktojn, sed maltoleremo de diferencoj. Nur justa, samrajtiga paco povas daŭri kaj tio validas inter individuaj homoj kiel inter nacioj.

La historio, aparte de Eŭropo, montras ke la senbrida suvereneco de nacioj emas favori militojn. Jam en 1915 Zamenhof rekomendis « Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo », por eviti militojn estonte. La eŭropa integriĝo kiu estiĝis post la Dua Mondmilito sukcesis meti finon al la longdaŭra malamikeco inter Germanio kaj Francio kaj iom post iom pligrandigi areon de paco preskaŭ al la tuta Eŭropo. La eŭropa integriĝo baze de agnosko de la samrajteco de ĉiuj civitanoj povus esti modelo por aliaj mondregionoj.

Sed Zamenhof proponis ne nur politikan kaj ekonomian egalecon de civitanoj, sed ankaŭ kulturen kaj lingvan egalecon, en mondo kie fortuloj ne plu trudus sian lingvon al aliaj. Eĉ en Eŭropo la vizio de Zamenhof estas ankoraŭ for de ties realiĝo. Bezonatas malferma diskuto pri paca kunekzistado de malsamaj religioj kaj kulturoj. Samniveleco de respekto estigis pacan finon de la konflikto en Nord-Irlando, kiu daŭris jarcentojn. Monda paco estas malfacile realigebla, sed ĝi estas realigebla. Ni laboru por ĝi!

Komentoj de legantoj pri ĉi tiu ideo estas bonvenaj.  
Seán Ó Riain

## TRANSDONITA PETO AL UNESKO

**„Tion, kio estas neebla – ni plenumas tuj, je mirakloj oni devas momenton atendi...”**

La titola konstato estas vera, kondiĉe ke temas pri la agado en esperantista medio plena de helpemaj bonvoluloj, pretaj tuj engaĝiĝi en laboro „por publika bono”, speciale - por bono de Esperanto! Jen rakonto pri realigado de gravega „neeblaĵo”:

La 15-an de januaro 2015 ni sukcesis aranĝi kondiĉojn, por ke la 2017a jaro estu dediĉita de UNESKO kiel monda Zamenhofa Jaro! Tio okazos lige kun 100-jara mortdatreveno de nia Majstro! Tre helpis al nia afero la fakto, ke en Ministerio de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo (MKkNH), oni memoris pri nia lasta aktivado por enlistigi Esperanton kiel kulturen heredaĵon. Tial, kiam iĝis ebleco proponi far pola registara institucio al UNESKO du gravajn, mondfamajn poelojn, la Ministerio elektis inter multaj proponoj ĝuste nomojn de Ludoviko Zamenhof kaj Tadeusz Kościuszko. Por famigo de T. Kościuszko laboras granda, forta Instituto lianoma, kiu tre rapide povis prepari necesajn dokumentojn. En alia flanko estis ni – kelkaj homoj el diversaj E-organizaĵoj, kiuj ricevis nur du labortagojn por prepari la dokumentaron por tiu ĉi celo!

Imagu – pri la ŝanco por aranĝi Zamenhofan Jaron, ni eksciis el letero de MKkNH, kiu venis posttagneze merkredon, la 7-an de januaro. Mi tralegis ĝin vespere kaj tuj dissendis al esperantistoj, pri kies helpo oni povus kalkuli. Kun la propono venis ligilo al 9-paĝa regularo de UNESCO en la angla lingvo. La ministerio atentigis, ke ilia propono validas ĝis lunda mateno (la 12-an de januaro), kiam plenigitaj formularoj en pola kaj angla lingvo devas troviĝi sur tablo de la ministro. Tio signifis, ke ni ricevis nur du labortagojn kaj semajnfinojn por trovi la ĝustajn homojn kaj laborigi ilin en la tuj plenumenda tasko!

Mi devis preni rolon de kunordiganto de tiu tre honora kaj kapdoloriga taskaro, ĉar la tiel nomata reprezentanto de la estraro de EDE-PL Jerzy Walaszek, al kiu estis direktita oficiala letero de la Ministerio, informis la Kulturministerion, ke ili bezonas unu aldonan monaton por ĉion aranĝi (kvankam la regularo montris precizan, mondan datlimon por ĉiuj interesitoj), kaj mi timis, ke la ŝanco povus vaporiĝi. Feliĉe – kiel ĉiam tre engaĝiĝis samideano Kazimiro Krzyżak (forigita sen klarigo el la estraro de EDE-PL) kun ankaŭ jam eksaj estraraninoj de EDE-PL - Gizela Matray kaj Dorota Burchard. Tial ili jam estis radiko por prepari la proponon nome de „socia grupo de agantoj” (al kiu mi ankaŭ aliĝis), kaj MKkNH permesis al ni prepari la formularon, se ne funkcias „normala estraro” de EDE-PL.

Sed problemoj komenciĝis jam de la unua paŝo: ni ĉiuj ne konis sufiĉe bone la anglan, por traduki la UNESCO–regularon pri la temo kaj la ĝustan formularon. Tial mi tuj sendis peton al Seán Ó Riain por traduki la regularon pri la temo kaj plenigi la ĝustan formularon nome de Pola Esperanto-Asocio.

Ne ĉiuj kredas je intuicio/antaŭseno, sed io min konvinkis subkonscie, ke la afero estas tiom grava, ke oni devas „stimuli la sorton” – mi decidis gvidi samtempe 2 diversajn fadenojn de la preparoj: unu nome de PEA kaj la duan – anstataŭ EDE-PL. Tial estis engaĝigitaj multaj personoj, kiuj dum tiom mallonga tempo sukcesis prepari du diversajn proponojn al la Ministerio. Kaj okazis, ke mia intuicio ne eraris – unu el la projektoj estis maltraktita pro unu malĝusta frazo kritikanta EU, pro kio ĝi estis rifuzita. Sed restis la dua, preparita paralele, kio savis la aferon.

Mi volas montri al vi teamon de eksterordinaraj homoj, kiuj lasis siajn okupojn, kaj dum mallonga periodo donacis sian atenton kaj zorgon por nia kuna tasko – okazis dekoj da skajpo-interparoloj, retaj kontaktoj kaj eksterlandaj telefonoj, helpis min eĉ nekonataj homoj, tradukante kaj korektante ĉiujn frazojn de la dokumentoj. Do – kronologie: Seán Ó Riain – kiel tradukanto de la regularo kaj pleniganto de la formularo por PEA, Jozef Reinart, Petro Balaz – kiuj helpis formuli la taskaron en la formularo, Bożena Kocyk – tradukis tion al pola lingvo, kaj la samon faris filino de Ewa Szymanska loĝanta en Londono, dum nokto (mi ricevis la perfektan tradukon je 5-a h. matene), Stanisłavo Mandrak – kiu subskribis kaj stampis la dokumentojn kaj devis veturi dimanĉe al Katowice por sendi tion per trajna kuriero al Varsovio, kie jam atendis la koverton Alina Mozer, por kunporti ĝin matene al la Ministerio...

La duan fadenon ni komencis de alia flanko pro la manko de lingvokono: unue ni plenigis la formularon pollingve kaj tion faris Gisela Matray laŭ kunaj konsiloj kaj centoj da telefonaj interparoloj, ĉar ŝi nune loĝas en Sicilio! La teksto estis kompilita de Gisela kun konsiloj de Kazimiro Krzyżak, Dorota Burchard kaj mi. Por prepari teknike la formularon, helpis Alina Mozer kun la edzo, ĉar estis bezonata tabelo, kiun ni ne kapablis fari. Kiam la dokumentoj jam estis pretaj – mi turnis min al Łukasz Żebrowski, por ke li trovu tradukantojn inter junularo, plej bone regantaj la anglan lingvon. Kaj li trovis! Post kelkaj horoj, danke al helpo

de PEJ/TEJO–anoj ni havis la dokumentaron, kiun transdonis al la Ministerio kun sia subskribo Kazimiro Krzyżak – sukcese kaj ĝustatempe! La junuloj, kiuj rapide tradukis niajn dokumentojn al la angla lingvo estis: Agata Cichocka, Tobiasz Kubisiowski, Tomasz Szymula kaj provlegis ĝin „denaskaj anglalingvanoj” Meiyer Goren kaj Rogier Huurman.

Jen nia Esperantujo! Mirinda spaco, kie oni povas kalkuli ĉies helpon eĉ de nekonataj homoj - por ke neblaĵo estu tuj realigebla!

Halina Komar

## MALAVANTAĜOJ DE ESPERANTO-MOVADO KAJ DE ESPERANTISTOJ



Por fari la tiel nomatan SWOT-analizon de iu entrepreno au iu ajn celgrupo oni devas unue analizi la proprajn avantaĝojn sed ankaŭ la proprajn malavantaĝojn kaj tiam la avantaĝojn en la ekstero kaj la malavantaĝojn. Ĝis nun neniu faris seriozan analizon de la malavantaĝoj de la E-movado. Jen mi provas ĉi tie fari tion listigante ilin laŭ hazarda sinsekvo.

1. Esperantistoj estas ege grandaj individuistoj, aplombaj personoj, kiuj malfacile lasas sin konvinki kaj ĝenerale estas tre malfacile organizi grandan kvanton da ili por engaĝi ilin ĉirkaŭ unu celo. Do, atingi pretecon komune labori por iu prioritata celo dum pli longa periodo ne estas eble. Ĉiu havas sian ideon kaj ne akceptas kunlabori kun aliaj aŭ kun la movadaj organoj.
2. La konsekvenco de la supra karakterizo estas ke esperantistoj estas ankaŭ sufiĉe kverelemaj. Pli ol individuoj en popolgrupoj. Tial ofe fondiĝas novaj asocioj kaj asocietoj nur pro tio ke kverelis iuj gvidantoj kaj kreis disipajn asociojn. Ofte aperas kelkaj naciaj asocioj kiuj konkurencas inter si kaj domaĝas unuj al aliaj.
3. Malemo al profesieco. Verŝajne pro la jam Zmenhofa tro-idealismo kiu malakceptis la ideon ke Esperanton povus (mis)uzi malmoralaj homoj inter kiuj ankaŭ komercistoj, ankoraŭ nuntempe la plimulto de esperantistoj kontraŭstaras ĉiujn tiujn kiuj provas profesiigi iun ajn formon de poresperanta agado kaj subfosas tion. Tial ni apenaŭ havas profesiajn (entreprenojn, entreprenetojn en kiuj iuj laboras porsalajre). Oni permesas eventuale profesiajn personojn en centraj internaciaj organizaĵoj kaj pli fortaj naciaj kiuj zorgu pri la servoj al la membroj. Pli estas malpermesate. Kaj sen profesia laboro neniu serioza agado povas esti sukcesa.
4. Sinceraj esperantistoj (homoj kiuj lernis E-on kvalite) estas kutime personoj kiuj ekhavas motivon por finlerni ĝin nur kiam ili ekkonas ĝiajn ideajn aspektojn. Tio signifas ke la esperantistoj estas pacemaj homoj kiuj malŝatas batalemon kaj riskemon, do esence estas iom pli timemaj ol averaĝaj civitanoj. Pro tio ili pretas intelektu diskuti, babili, renkontiĝi,

turismi, sed ne pretas serioze surstrate protesti, politike engaĝiĝi aŭ partopreni en projektoj kiuj postulas monajn riskojn.

5. Kiel idealistoj esperantistoj kutime estas homoj kun malmulta mono. Praktike ne ekzistas milionuloj kaj do la movado estas esence senkapitala. Ĝi ne povas kolekti sumojn per kiuj eblus serioze atentigi la mondon pri la ekzisto de Esperanto. Sed pri tio ili eĉ fieras.
6. En la movado estas meze pli ol en normala popolgrupo da grupfanatikuloj, kiuj domaĝas la pozitivajn akiraĵojn per fanatikaj agoj. Multaj montras sin antaŭ neesperantistoj kiel sektaj frenezuloj kaj multaj kuraĝas skibi al aŭtoritatoj ofendajn protestojn pro tio ke tiuj ne volas tuj enkonduki Esperanton en la lernejojn ks.
7. La movado pro ĉio tio estas malmultpersona kaj pro la manko de grandaj homkvantoj la gvidstrukturoj de la movado enhavas malmultajn altkvalitajn gvidantojn. Tial plimulte en la lokaj kaj ofte naciaj organizaĵoj la gvidantaro konsistas el mezkvalitaj personoj kiuj sin opinias granduloj (mediokritoj). Kiam mediokrito transprenas pozicion de societa ĉefo, li/ŝi ĝin ne ellasas, ĉar li/ŝi ja ne povas iĝi ĉefo en normala socio. Tia mediokrito batalos ĉiurimede por forigi konkurencon kaj pro tio la movado:
  - A) ne havas junularon en la bazaj gvidantaroj kaj ĝenerale oni forpuŝas la gejunulojn kiuj ne akceptas gvidadon de medokritoj
  - B) koalicias kun malpli kapablaj ol ili mem estas
  - C) klopodas ke la societo ne aktivu, ĉar pro aktivado povus aperi novaj homoj, kiuj estus konkurenco por la pozicio, do maksimume pasivigas la lokan agadon.

Eble estas kelkaj pliaj malavantaĝoj, sed mi kredas ke ĉi tiuj estas la plej gravaj.

Zlatko Tišljar

## 82-A ITALA ESPERANTO-KONGRESO EN SAN BENEDETTO DEL TRONTO



Vi vizitis Vatikanon, Koloseon, Florencon kaj Venecion kaj pro tio vi pensas, ke vi bone konas Italujon. Sed mankas al vi sperto de partoj de la lando, kiujn ni konservas nur por ni. Ekzemplo de tio estas la landoparto 'Marche' [Marke]. Rigardu ĝin en Jutubo:

<https://www.youtube.com/watch?v=JlYcnevLPI0>


kaj poste diru al ni ĉu ni ne prezentas al vi duan landon tre vidindan.

La Itala Esperanto-Kongreso ne estas itala sed ĉefe internacia kaj ĝi miksas en ĝusta kvanto kulturajn programerojn, sunon kaj maron, esperantismen, koncertojn en Esperanto kaj feriojn. Ĝi okazos de la 22-29-a de aŭgusto 2015.

Cetere bonvolu ne forgesi, ke la festpreleganto estos la prezidanto de UEA, Mark Fettes. Iru al nia paĝaro <http://kongreso.esperanto.it/82/> kaj aliĝu. Se vi ne kapablas naĝi indas lerni, ĉar tie vi havas la tutan adriatikan maron je dispono.

La LKK

## HISPANA ESPERANTO-KONGRESO EN CULLERA (VALENCIO)



La unua aliĝperiodo por la venonta Hispana (kaj Valencia) Esperanto-Kongreso finiĝas la 15-an de februaro, Memoru ke la renkonto okazos en la tre turisma urbo Cullera (Valencio) komence de majo.

Ĉiuj ĝisnunaj informoj disponeblas en la retejo <http://esperantoval.org/cullera2015/eo/> inklude de provizora programo, kotizoj, aliĝmanieroj, ktp. Tre baldaŭ oni havos pliajn novaĵojn.

Se vi uzas la socian reton Fejsbuko, la evento jam disponas je paĝo tie <https://www.facebook.com/events/336500613218723/> Se vi havas dubojn, aŭ volas iel kontakti la organizantojn, ne hezitu fari ĉe la adreso [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es).

José Antonio del Barrio

## PROGRAMO DE KASTELO GRESILLON 2015

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj dum ĉiuj sezonoj, kun E-kursoj kaj aliaj aktivaĵoj:

3a – 8a de aprilo 2015: Renkontiĝo de *Interkant'* kaj kunkantado kun *La Kompanoj*  
 17a – 25a de aprilo 2015: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut - vidu rete <<http://gresillon.org/printempas>>  
 25a – 26a de aprilo 2015: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) - vidu rete <<http://gresillon.org/printempas>>

20a – 25a de julio 2015: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso - vidu rete <<http://gresillon.org/s2>>

1a – 8a de aŭgusto 2015: Lingva semajno, Lingvofestivalo, tuj post UK - vidu rete <<http://gresillon.org/s3>>

8a - 16a der aŭgusto 2015: Festa Semajno por infanoj kaj familioj - vidu rete

<<http://gresillon.org/s4>>

oktobro 2015: AŬTUNE, lingva seminario kun Christian Rivière k.a.

Jara agendo/kalendaro en [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo) <<http://gresillon.org/agendo>>

Por la aŭgustaj semajnoj aŭ poste, ni bonvenigas viajn proponojn por instrui vian lingvon aŭ Esperanton, por prelegi/koferenci aŭ por animi aktivaĵojn por infanoj. Skribu al [bertox@free.fr](mailto:bertox@free.fr)

Maison Culturelle de l'Espéranto / EsperantoKultur-Domo  
Château de Grésillon  
St. Martin d'Arcé  
49150 BAUGÉ-EN-ANJOU  
Francio

## 92-A GERMANA ESPERANTO-KONGRESO

Koran bonvenon al la 92a Germana Esperanto-Kongreso de la 22a - 25a de majo 2015 en Hamelno (Hameln)!

Jam pretas la reta aliĝilo. Jen la rekta aliĝilo al ĝi:

<https://www.esperanto.de/civicrm/event/register?reset=1&id=1>

La unua plej malmultekosta aliĝperiodo estis la 31a de januaro 2015.

„Karulo, kie do estas la infanoj?“

En la jaro 1284 je tago de Johano kaj Paŭlo buntvestita viro delogis 130 hamelenajn infanojn el la urbo. Ili malaperis en monto kaj neniam plu estis reviditaj.



Ankoraŭ hodiaŭ tiu mistera legendo tiras vizitantojn el la tuta mondo al Hamelno. En la jaro 2015 je la Pentekosta semajnfino ni klopodas allogi en la urbon almenaŭ 130 Esperanto-parolantojn al la 92-a Germana Esperanto-Kongreso. La sentimulojn atendas diversaj programeroj pri la temo: fabeloj, rakontoj kaj legendoj. „Legendo kaj lingvo allogas“ estas nia kongrestemo. Sed ne nur la Ratkaptisto malsekurigis la

Vezermontaran landon, ankaŭ la barono von Münchhausen ĉi tie disvastigis siajn mensograkontojn kaj la fratoj Grimm lasis al si rakonti pri Dornrozinjo kaj Cindrulino.

Nia kongresejo situas en la malnova urboparto en la ombro de la respektinda Münster-preĝejo. Ni ja estos en la mezo: meze en la urbo kaj meze en la hamelena (kultur)vivo. Ni kompletigos la tradicie multlingvan pentekostan diservon kaj la liberaeran Ratkaptistan

teatraĵon per Esperanto. En la kulturcentro okazos publika Esperanto-konzerto de la grupo „Asorti“ el Litovujo.

Aliĝilon kaj pliajn informojn pri la ampleksa kaj interesa programo kun pupeteatraĵo, koncertoj, prelegoj, diservoj, ekskursoj, gufujo, drinkejo, diskejo, ktp. vi trovas sub la ligo: [gek.eo.tel kaj http://www.esperanto.de/dek2015](http://www.esperanto.de/dek2015).

Koran bonvenon!

Heinz Wilhelm Sprick

## MONDAJ PUPEKSPOZICIOJ



De 2010 okazas la Mondaj Pupekspozicioj en la urbo Higashikagawa-shi (Japanio). La fondinto de la evento estas s-ro Etsuo Miyoshi, kiu nuntempe prezidas la Komitaton por la Mondaj Pupekspozicioj.

En 2015 la kolekto kalkulas je ĉ. 1,500 pupoj el 70 landoj, inkluzive de Esperanto-lando. Ĝi estis farita danke al esperantistoj de la tuta mondo, homoj kun tre varia fono: juristoj, pastroj, kantistoj, politikistoj, ktp. La pupoj portantaj

tradiciajn vestaĵojn estas montrataj en standoj kun afiŝoj donantaj informojn kaj fotoj pri la devenlandoj, la sendintoj, turismaĵoj, ktp. La ambasadoj de la landoj reprezentataj kunlaboras sendante afiŝojn, broŝurojn, filmojn, ktp. Tial, rigardante la pupojn eblas fari mondvojaĝon al vere foraj landoj.

Ĉiujare la ekspozicio estas dediĉita al iu lando. En 2013 estis la vico de Pollando, en 2014, Argentino kaj en 2015, Francio. Gesinjoroj Lafargue el Parizo decidis malavare donaci sian plujare faritan pupkolekton kun pli ol 110 pupoj el la tuta mondo.

Ni ĉiam kalkulis je la aŭspicio de la Ministerio pri Kulturo, Ambasadoj en Japanio kaj de lokaj registaroj. La kultura programo enhavas diversajn erojn: dancojn, pentraĵojn pri temoj ligitaj al la omaĝata lando, prelegojn, pladojn el eksterlanda kuirarto, ktp. Ĉi-jare la kantisto jOmO estas invitata veni kaj la direktoro de Franca Alianco (Alliance Française) gvidos atelieron pri francaj dancoj.

La pupekspozicio estas grava iniciato en nia urbo, ĉar ni povas montri la kulturen diversecon de la homaro. Ĝi estas maniero por konigi al la vizitantoj pri la lokaj produktoj de Higashikagawa, kio povas helpi kreskigi nian ekonomion. 30 volontuloj, inter kiuj pluraj esperantistoj, helpas en ĝia organizado ĉiujare kaj ankaŭ lokaj infanĝardeno kaj mezlernejo.



En la periodo 2013-2014 en la amaskomunikiloj aperis 107 raportoj en 19 landoj (TV, ĵurnalo, radio, ktp.). De la pasinta jaro ni havas 3-lingvan hejmpaĝon ĉe <http://world-dolls-exhibition.org/> Pupsendintoj antaŭ ol liveri la pupojn dum gazetara konferenco diskonigis la novaĵon, kio estis eksterordinara okazo por emfazi la rolon de Esperanto kiel kulturperilo.

En nia kolekto la plejparto el la Eŭropa Unio estas reprezentata, sed ankoraŭ mankas pupoj el Aŭstrio, Cipro, Estonio, Finnlando, Grekio, Irlando, Luksemburgio, Malto, Portugalio kaj Svedio. Ni volonte akceptas donacojn de pupoj el tiuj landoj. Ilin vi povas sendi al la artikolaŭtoro. Koran dankon!

Etsuo Miyoshi

## **PROpono DE CIVILA SERVO en la departemento «Côtes d'Armor» en Bretonio, Francio**

La asocio «Armor-Esperanto» serĉas junan esperantiston por plenumi Civitan Servon kies celo estas interesigi, ĉefe la junulojn, pri uzado de E-o kiel komunikilo internaciskale. Misioj proponitaj:

- partopreni en instruado de E-o al novaj publikoj: infanoj kaj junuloj en lernejoj kaj junlaboristaj loĝejoj;
- partopreni en estigo de rilatoj inter ties junuloj kaj eksterlandaj junuloj
- partopreni en la akcepto de eksterlandaj esperantistoj: preparado de ties prelegoj kaj restado en la departemento
- partopreni en la organizado de eventoj faciligante la interŝanĝojn inter lokaj kaj fremdaj esperantistoj
- partopreni en la kreado kaj plibonigo de instruiloj
- partopreni en la komunikado de la asocio departementoskale: rilatoj kun la lokaj gazetoj kaj radioj, kreado/plibonigo de flugfolioj, broŝuretoj, ekspoziciopaneloj kaj plibonigo de la retejo de la asocio.



La fina elekto de la misioj estos difinita kun la junulo, laŭ ties deziroj, kapabloj kaj persona profesio-projekto. Por plenumi la taskon la junulon helpos la asocio per aliĝo al:

- esperantaj kursoj kaj studperiodo (en la kastelo de Greziljono);
- kursoj por plibonigi la kapablon paroli france.

Kondiĉoj:

- aĝo: de 18 ĝis 25 jaroj
- agadi por la asocio po 24 horoj semajne
- havi la naciecon de unu el la landoj de la

Eŭropa Unio (pro la franca leĝo)

- paroli Esperanton kaj la francan minimume je la nivelo B1 laŭ la KER

La junulo ricevos ĉiumonate :

- stipendion de la franca ŝtato (467 €)

- monhelpon de la asocio por nutraĵo kaj privataj veturadoj (106 €)

La franca ŝtato zorgas pri la sanasekuro.

Daŭro: 8 monatoj

Dato de la komenco: de la 1a de aprilo 2015

Kontakto: Laurent PEUCH

Se vi interesiĝas, sendu vian kandidatiĝon (kun vivresumo, kaj motiviga letero) ĝis la 1-a de marto al la adreso: [ltpeuch@hotmail.com](mailto:ltpeuch@hotmail.com) .

Philippe Stride

## **LETERO AL PARLAMENTANOJ DE EU-PARLAMENTO**

Eŭropo-Demokratio-Esperanto lanĉis la jenan kampanjon:

Vi scias pri la Transatlantika Traktato, ke Usono kaj la Eŭropa Komisiono traktadas por akcepti Transatlantikan Traktaton, kiu estigus seriozajn konsekvencojn por la eŭropanoj se ĝi estus subskribita. Ĝi disponigus al grandkompanioj ekstereŭropaj preskaŭ senlime vendadi sur eŭropa merkato ofte dubindajn produktojn kaj donus al ili la rajton procedi kontraŭ EU-ŝtatoj pro lezo de monda libera komercado, se unuopaj ŝtatoj havas leĝojn kontraŭ ekz. genetike ŝanĝitaj produktoj kaj simile.

Ni skribis al la deputitoj de 3 francaj departementoj (Hérault, Pyrénées-Atlantiques, Tarn -et-Garonne) en kiuj ni loĝas. Vi trovos ĉi-sube la esperantan tradukon de la sendita letero. Ni petas de vi la sendon de similaj nacialingvaj leteroj al la deputitoj de via lando. Ni insistas pri la neceseco ke multaj deputitoj de la Eŭropa Unio ricevu tian korespondaĵon por la efikeco de la ago.

Propono de la letero:

Temo: Pri la Transatlantika Traktato

Sinjoro Deputito,

Usono kaj la Eŭropa Komisiono traktadas, en la plej granda sekreto la Traktaton. Laŭ kelkaj informoj, kiuj filtriĝis, tiu Transatlantika Traktato estigus katastrofajn konsekvencojn por la estonteco de la eŭropaj civitanoj. Pro tio, ni petas vin ke vi intervenu por:

1. konigi la enhavon de tiu Traktato,
2. la organizo de debato en la publikaj radiaj kaj televidaj kanaloj,
3. la organizo de referendumo en ĉiuj landoj de la Eŭropa Unio por ratifiki aŭ ne ratifiki la Traktaton.

Ni atendas vian respondon.

Bonvolu ricevi, sinjoro deputito, sincerajn kaj eŭropajn salutojn de la membroj de ...

André Weiss, Colette Weiss kaj Thierry Saladin.

## EN SLUPSKA UNIVERSITATO DOKTORIĜTEZO PRI ZAMENHOF



Sinjoro Mariusz Borysiewicz skribas laboraĵon kiel doktoriĝkandidato pri Ludoviko Zamenhof, lia lingvo kaj liaj ideoj en la Slupska Universitato, Pollando. Tiukaze oni prezentis E-ekspozicion en la Universitato de Slupsk kaj laborrenkontiĝon kun la Urbestro de Slupsko, Roberto Biedroń.

Eduardo Kozyra

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

**Finredaktita: la 31-an de januaro 2015**

**Redaktoro:** Zlatko Tišljarić

**En la numero kunlaboris:** Seán Ó Riain, Zlatko Tišljarić, Halina Komar, Heinz Wilhelm Sprick, José Antonio del Barrio, Etsuo Miyoshi, André Weiss, Colette Weiss, Thierry Saladin, Philippe Stride, Eduardo Kozyra.

**Kontakto:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

**Retpaĝo:** <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

